

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 4/2004
Dumonata bulteno eldonata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Aŭgusto 2004

Look inside for:

Kiel mendi bieron...	2
Being Understood	3
TKEK 2004	4
ELNA's Mission?	5
Novaj Libroj	7
Dufoje NASKinta	8
Sufero de Udegeo	9
Korespondantoj	10-11

We recommend joining the following two mailing lists by sending a blank message to the given address:

Announcements from ELNA:

elna-anoncoj-subscribe
@yahoogroups.com

Discussions among members of ELNA:

elna-members-subscribe
@yahoogroups.com

ELNA/KEA Kongreso 2004

de Arlyn Kerr

La ELNA/KEA komuna kongreso okazis en Sidney, Brita Kolumbio, de la 16a de julio ĝis la 19a, 2004. Tio estis la tria fojo, kiam ELNA kaj KEA kunsidis. (La unua estis en 1978 en Milwaukee, kaj la dua estis en Montrealo en 1998.)

Sesdek ses personoj partoprenis: 44 usonanoj, 19 kanadanoj, 2 meksikanoj, kaj 1 irlandano. Aldone, 5 personoj aliĝis kiel subtenantoj, kaj mi denove volas danki ilin: Ellen Eddy, Jay Fishman, Dori Wheeler, Mignon Belongie, kaj Jane Stranske. Ili ricevis ĉiutagan retpoŝtan raporton el la kongreso, kun fotoj, kaj ricevos limakpoŝte sakon kun la kongresaj materialoj.

La programo estis plena kaj bunta, dank' al la helpo de Jim Henry, Geoffrey Greatrex, Alex Schlafer, Wally du Temple, Olga du Temple, David Yaki, Lusi Harmon, Jim Droege, Haruo Ros', Arlyn Kerr, kaj Diana Fobes. Estis multe da kantado, kaj mi suspektas ke neniu forgesos la mirindan "disko"-dancadon de Anderson Mills post la bankedo en greka restoracio. Dank' al la Sidney LKK, ni ĉiam havis

bongustajn trinkaĵojn kaj frandajn.

La kongreso estis dediĉita al la memoro de Sid kaj Ruto Culbert, kiuj forpasis en la pasinta jaro. Ili estis dum multaj jaroj fervoraj subtenantoj de Esperantaj agadoj en la nordokcidenta regiono de Usono kaj Kanado. Tablo de memorajoj montriĝis, kaj ni aŭkciis librojn kaj malnovajn gazetojn el la kolekto de Sid kaj Ruto, por gajni monon por ELNA.

La vetero estis belega, seka kaj varma sed ne tro. Sidney estas pitoreska, apudmara urbeto. Dimanĉon multaj partoprenantoj aŭtobusis al Viktorio por vidi la ekspozicion Eterna Egiptio en la provinca muzeo. Dum kaj post la kongreso aliaj iris al la fama Butĉarta Ĝardeno kaj aliaj lokaj vidindaĵoj.

Kelkaj partoprenis en postkongresa ekskurso al Vankuvero, gvidata de Wally du Temple kaj Lusi Harmon.

La venonta ELNA kongreso okazos en Austin, Teksaso, de la 10a ĝis la 13a de junio, 2005. Vidu <<http://www.esperanto.org/ELNA/kongreso2005>> por pli da informo.

Esperanto League for North
America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO
☎510/653-0998; 📠510/653-1468
✉elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Alexander Shlafer
Vice President/Vicprezidanto: Phil Dorcas
Secretary/Sekretario: Anna Bennett
Treasurer/Kasisto: William B Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Thomas Alexander, Joel Amis, D Gary
Grady, Anjo Harlow, Lusi Harmon, Jerry
Johnson, Orlando E Raola, Jacob
Schwartz, Tim Westover

*Director, Central Office/Direktoro de la
Centra Oficejo:* Joel Brozovsky

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the
Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 40, No. 4
ISSN 1056-0297
Editor/Redaktoro: Don Harlow
☎510/222-0187; 📠510/653-1468
✉ donh@donh.best.vwh.net

Materials for esperanto usa should be
sent to/Materialojn por esperanto usa
oni sendu al:

esperanto USA

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO
or by e-mail/aŭ retpoŝte al:
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin
are those of the authors, and don't
necessarily represent the point of view
of ELNA or its bulletin/La opinioj esprim-
itaj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj,
kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de
ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is
permitted, provided that due credit is
given, and a copy of the reprinted materi-
al is sent to ELNA/Estas permesate
reaperigi materialojn el ĉi bulteno,
kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj
ke oni sendu ekzempleron de la repu-
blikigita materialo al ELNA.

Deadline for issue 2004/6 Limdato por
numero 2004/6: 2004.12.23

Pekinaj Peko

De Ionel ONET

Estis varmege tiun post-
tagmezon de la 22a de julio, kiam
mi alvenis en Pekinon. Kvankam
mi estis iom laca post la longa flugo
de la okcidenta flanko de Eŭrazio al
ties ĉi oriento, mia sopiro al
aŭtentaj ĉinaj mangaĵoj pelis min
en la eksterajn varmegon kaj
haladzon. Mi estis promeninta
kelkajn minutdekojn kiam mi
restoracio (la ĉinan lingvon mi tute
ne konas, do mi ne povis legi la
surskribojn, ekskluzive en la ĉina
lingvo).

Mi eniris, kaj ĉe la pordo
bonvenigis min bela junulino en eĉ
pli belaj tradiciaj vestaĵoj: "welcome
sir please have a seat" (mankas
interpunkciaj signoj, simple ĉar laŭ
la intonacio de la parolintino mi ne
sciis kien meti ilin). Mi plezure
akceptis la inviton, revante, antaŭ
ĉio, pri granda biero, kiu redonus al
mi iom el la likvaĵo abunde
malsekiginta miajn vestaĵojn. La
ĉarma junulino akompanis min
senvorte al neokupita tablo kaj,
kvazaŭ prestidigitisto, aperigis
antaŭ min menuon komplete en la
ĉina. Vidinte sur apuda tablo
grandan botelon de biero, mi
elbuŝigis mian sopiron antaŭ ol mia
servistino sukcesis demandi pri
miaj deziroj:

"I would like a large Chinese
beer, please", mi sukcesis diri
antaŭ ol mi audis, tute sen rilato al
mia mendo, "do you eat meat" (nenia
demandtono en la ĵusa propozicio).

"Jes, please, but first I would
like a bottle of Chinese beer."

"Beef pork fish" (refoje nenia
spuro de demando).

"Beef, please, and some Chi-
nese beer."

"Vegetables" (tio sonis pli-mapli
kiel "ve-ge-ta-be-les", tamen ne kiel
demando).

"Yes, vegetables too, and a
beer."

"Rice" (nenia demandtono, sed
intertempe mi alkitimiĝis).

"Oh, yes, and some beer,
please."

"Big."

Nu, post tiom da torturado, mi
volonte trinkus eĉ du grandajn
bierojn: "Jeeees!, BIG, please."

La ĉarma kelnerino malaperis
kune kun sia nedeĉifrebla menuo
kaj mi ekatendis. Kaj atendis. Kaj
atendis. Kaj atendadis. Post ĉirkaŭ
horduono alproksimiĝis mian tablon
alia kelnerino portante pleton
ĉirkaŭ duonmetron longan kaj
kvaronmetron larĝan, sur kiu kuŝis
bele aranĝita porciaro de mangaĵo,
kiu facile nutrus kvar malsategajn
adoltojn. Mi gapis al tiu pantagruela
porcio kaj certis ke ĝi celas alian
tablon, plurpersonan. Rimarkinte
mian miregon, la kelnerino montris
al la numero de mia tablo, kiu
koincidis kun tiu sur eta slipo rande
la pleto. Mi daŭre ne povis kredi ke
tiu estas mia porcio, supozante ke
la 5 sur la slipo indikas nombron de
personoj. Mi lasis min konvinkita
nur kiam la unua kelnerino – ja
spertulo pri la angla – revenis ĉe mia
tablo kaj klarigis: "beef vegetables
rice big".

"OK, OK, but where is my beer?"

"Good appetite", mi aŭdis
kvazaŭ unuvoĉe dum la du junulinoj
ekmalproksimiĝis.

En tiu momento mia apenaŭ
eltenebla soifo igis min stariĝi kaj
kapti unu el la kelnerinoj je la
brako kaj preskaŭ treni ŝin al la
apuda tablo. De sur ĝi, je la
konsterniĝo de ĝiaj okupantoj, mi
prenis bierbotelon kaj persigne
provis klarigi: "one for me, please".

La okuloj de la junulino ekbrilis
kvazaŭ ŝi malkovrus novan
galaksion: "pi jiu". La fakto ke mi
aŭdis proksimume "piĉjo" apenaŭ
gravis. La sopirata biero kaj la
malvarmiganta plado estis pli
gravaj. Fine, mi ricevis la [tro] longe
sopiritan bieron (kiu montriĝis tute
nesufica) kaj ekfrandis la bonajon
antaŭ mi. Du horojn poste mi
ankoraŭ estis batalanta kun la
pladego kaj kun la dua biero, kiun
mi mendis ĉine: "piĉjo".

La tuto kostis al mi ĉirkaŭ ses
dolarojn kaj nokton de maldormo:
post tiom da mangaĵo mi apenaŭ
trenis min al la hotelo. Kaj dormado?
Nu, eble venontan nokton, sed sen
vespermanĝo.

Being Understood

By **Francisco Little** (*Beijing Review*, July 22, 2004, p. 46)

[This article was sent to me by Ionel Onet, via Bill Harmon. In reprinting it, I am probably influenced by the fact that, in 1986, exactly the same restaurant experience happened to me in Nanking. As the French say, plus ça change, plus c'est la meme chose ...]

At dinner the other night in a small, no-frills Sichuan restaurant, I was most impressed by the young waitress who greeted me in English. Her accent was almost tone perfect, as if she had recited each phrase repeatedly and committed it to memory.

It was only when I started up a conversation with her that I realized she had learnt the phrases, but knew nothing else. So our conversation went like this:

"Is the food delicious, sir?"

"Yes it is delicious, thank you. Your English is very good. How long have you been studying English?"

"Would you like more tea, sir?"

"Er, yes, I would, thank you. What is your name?"

"You are welcome to come again, sir." And so we went on. When she had used up all her memorized phrases out of context for the second time, I resorted to my limited Chinese, but our young lady was insistent. She wanted to use her English. Needless to say we got nowhere in a hurry. The meal was good though.

There is no doubt that China is serious about learning English. It has been reported recently in the media that about 5 million Beijing residents should be able to speak English before the 2008 Olympic Games – according to a plan to promote the language. The Beijing plan has come up with quotas for different skill levels of a cross section of Beijingers. Public servants under 40 are required to speak a minimum of 300 English sentences before 2008, according to a media report. Bus drivers and stewards need to know 100 English sentences, by that date, while shop

assistants under 40 need to pass a diploma test for retail English. Policemen, taxi drivers, hotel employees and restaurant staff are also part of the specified group in the plan.

Apart from English, police officers will also be taught Japanese, Russian and Arabic, to enable them to handle traffic control, safety checks, first aid and other situations.

Presently, it is said that just over 3 million Beijingers can carry on a simple English conversation.

Now if my waitress was one of these 3 million, I am wondering if this constitutes a simple English conversation.

The 5-million target is approximately 35 percent of the city's present permanent population. Monitoring the levels of proficiency should be interesting. Perhaps there will be a division of "English Police" who will appear unannounced and demand a recitation of 10 sentences, before making notes in a ledger and disappearing into the night. If nothing else one has to admire the grand level of commitment by the Beijing Organizing Committee for the Olympic Games.

If progress in the spoken word is being made, the written word is way out on a limb.

Every foreigner who has traveled in China will have a story to tell about an English-language sign that has been spelt incorrectly. These signs around Beijing not only confuse tourists but are also a continuous source of amusement. They can be found on billboards, menus, in public places and even on pirate DVD covers.

The Beijing Tourism Bureau recently held a too short, six-month campaign to improve Standard English usage at 60 famous scenic spots visited by foreigners, such as the Palace Museum and the Great Wall. People coming across a confusing sign were asked to phone a

hotline and report their find to the bureau for correction.

Problems range from obscure abbreviations, word-for-word translation of Chinese characters into English, improper omissions and misspellings.

Some of my favorite Chinglish bloopers signs are:

"Little grass is smiling slightly, please walk on pavement" – in a Beijing park;

"Please keep your legs" – next to the escalator;

"Reduce signs of premature senility" – on a bottle of face cream;

"Don't forget to carry your thing" – in the back of a taxi;

"To take notice of safe. The slippery are very crafty" – sloped entrance to mall opposite Beijing Railway Station;

"No fight and scrap, no rabble. No feudal fetish or sexy service permitted in the park" – Ming Tombs;

"Those who are drunk, sick or below 1.1 meters are forbidden to take part in suck game!" – at entrance to a Beijing park; and

"Unnecessary touching" – above automatic taps at Beijing Airport.

While we laugh at these and marvel at how they have been up for so long, as expats, part of what we can do is to try to help. Being in a foreign country undergoing change means whether we like it or not we become part of that change. Having a conversation with a waitress practicing her English, and pointing out what reply will come from a statement is a start. But if the city is serious about rectifying the Chinglish signs that adorn the capital, they need to advertise amongst expats where, how and when this can be done. Not just for six months, but on a permanent basis. Many feel the signs make Beijing one big amusement park and are part of the city's character, but if it's image Beijing is after the Chinglish signs have got to go. You can't have it both ways.

La ludema komunumo

de Keneĉjo Goldberg

Fort Mason, Sanfrancisko, estis bona ludejo por ĉirkaŭ dudek kvar, ofte to-ĉemizportantaj, kaliforniaj ludantoj ekde la 7a ĝis la 9a de majo

La TKEK, Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco, de 2004 havis kiel temon: Ni ludu per Esperanto!

Sub la aŭspicioj de SFERO, San Franciska' Esperantista Regiona Organizo, sekretario Bill Harmon perfekte organizas kaj prepares la festoon. Estis plej facile interkonatiĝi kun ĉiuj, aparte la du tre junaj knabinaj membroj! Kompren-eble, kaj mirinde, intimiĝis konatoj.

Vendredon vespere ĉiuj festis kun vervo. Babilado, jen profunda, jen sprita, ekscitis la la loĝejan kafejon.

Komenciĝis la ridego dum Lusi Harmon gvidis simpla, sed iel mistera, Ritmo-numeran ludon. Aŭskultinte legadon literaturan de Don Harlow, ĉiuj subite aktoriĝis, roligitaj de Leonora Brozovsky, legante, ĉiu en sia stilo, teatraĵon de Molière, "Don Juan", tradukitan de Emile Boirac (1851-1917;

esperantistiĝis 1900), unu el la plej bonaj stilistoj de sia tempo.

Venis Sabato! Komenciĝis ludado, en granda ĉambro, per elekto. "Amuzo per anglalingvaj lokucioj" ["Donu al mi rompon - Give me a break - Indulgu min"] gvidis Doroteo Holland.

Anstataŭ jongli vortojn, entuziasmaj atletoj objektojn jonglis kun Joel Brozovsky.

Sekvis la ludo goo, kies misterojn komencis klarigi Ed Williger.

Kun tagmanĝo venis, kompren-eble, babilado, konversacio, atendita konsilo.

Animita, videodiska desegno-filmo, *Nokto de la galaksia fervojo*, sekvis. Kvankam ĝi estis aŭdata dualingve (laŭ la to-ĉemizo de Doroteo: angle), iu ajn ekkriis esperantaj vortojn, kiam ili videblis sur la ekrano.

Por ridegado, ludu "Gajecon!" Grupo ĉirkaŭ granda tablo, kun karteĝo antaŭ ĉiu, eksciis tion ĉi, gvidate de Joel. Tiu rava, ŝajne

simpla, ludo kuraĝigas la gajnanton elpensi ridegindan frazon el kvin (eble dek!) diversaj, tre simplaj, vortoj. Tiel ĉi kunligiĝis la komunumo ludema.

Dum paŭzo estis okazo viziti la ELNA-jn librotablojn, kie Don aŭ legis aŭ babilis.

Transkoridore oni povas flari la diversajn ĉinajn pladojn. Ĉiuj bankedis, konversaciis, kaj ĝuis la diversecon de samideanoj ĉirkaŭe.

Ĉarli Galvin kaj amuze kaj ekscite aŭkciis.

Inter la salutoj de kluboj, anoncis Doroteo, ke la TKEK 2005 situos en Santa Barbara. [En la fina semajnfino de februaro. -DH] Ĝia temo: "Harmonio".

Venis la tridek (kaj unu aldonajo) demandoj, dum dek kvin minutoj, de Don.

Temanta pri Esperantaj aferoj, ĉi tiu ludo neniam facials por ĉiuj; la espero estas: por unu!

Kantado estis akompanata de gitaro kaj banĝo en harmonio, la temo de la jaro venonta.

Jim Henry, ELNA's Commissioner for Congresses, whose job is to help local congress committees play forthcoming ELNA congresses, has made a draft version of a handbook for organizing such congresses available on-line at <<http://www.mindspring.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm>>. The draft is in Esperanto. If you'd like to see how to put on an ELNA congress, please visit it.

Incidentally, next year's ELNA congress will be held over the weekend of June 10-13, 2005, in Austin, Texas. Information about the congress can be found at <<http://ruscon.org/esperanto/2005.html>>. Please mark your calendar.

"Esperanto stands the test of time as speakers hail it as a 'bridge'", says Scott Petersen, staff writer for the Victoria, B.C., *Times Colonist*, in a very favorable three-column article on July 19, 2004.

"'One who hopes': The Promise of Esperanto" is the title of a good two-page article by translator Wassim Nassif in the September 2004 issue of *Translorial*, the newsletter of the Northern California Translators' Association. A third page contains the song "La Espero" and a sidebar with bits and pieces of additional information about Esperanto.

De la 10-a al la 13-a de junio de 2005, la Landa Kongreso de ELNA okazos en Aŭstino, Teksaso. La kongreso havos literaturan temon, kun gastoj Edwin de Kock kaj Peter Browne inter aliaj. Ankaŭ estos pli da klasoj kaj kunsidoj por komencantoj kaj junuloj, por kuraĝigi pliajn novulojn partopreni. Pli da informo aperos en via leterkesto poste, kaj ankaŭ ĉe <<http://esperanto.org/ELNA/kongreso2005>>. Dume bonvolu plani viziti Aŭstinon dum la dua semajnfino de junio venontan jaron por ĝuebla kongresa sperto!



ELNA Kongreso 2005 en Sidney, BC, KANADO

From Dream to Reality

At the recent meeting of the ELNA board in Sidney, B.C., your board discussed ways to evaluate and reestablish ELNA's mission statement. We would like your help in doing this.

Between now and the next national congress (June 10 - 13, 2005) we are asking you to think about and discuss your dreams, vision, mission, and goals for ELNA. You may do this with your Esperanto friends at your local group meeting. This may be a good discussion topic for your next conversation circle. We want you to bring your ideas to Austin, Texas, so that we may collect your feedback regarding what you want ELNA to be and to do.

Perhaps you wish to consider how

ELNA might change to keep up with modern needs, or perhaps you want to accent what is already being done well so that we don't neglect an important service. What does ELNA mean to you? What can we do for you? What SHOULD we do for you? How can ELNA help you to attain your goals as an Esperanto speaker? What can ELNA do for Esperanto? And what can you, the member, do for Esperanto with the help and support of ELNA?

Please consider that ELNA is not just a couple of guys in an office somewhere in California. Of course, what Joel and Don do in the Central Office is crucial to our activities, but ELNA includes the entire membership. We are a diverse membership with diverse needs, diverse ideas. The board wants to know what those needs and ideas are.

We are not giving you a form to fill out. This is not a structured survey. Feel free to

use any format to convey your ideas for ELNA, and we will gladly consider each one. We hope that you can attend the congress, but if you cannot, please give the results of your consideration to someone who is going. Or you may give your information to any board member.

Please pardon that this is in English, but I want everybody to be able to understand this important initiative even if you are a newcomer to Esperanto-land. One of my favorite quotes is from Gandhi: "Be the change that you want to see in the world." This is an opportunity for you to do exactly that. We welcome your contributions.

Kunlabore,

Phil Dorcas

ELNA commissioner for local groups
<pdorcas@sbcglobal.net>

Sikosek, Ziko Marcus: Esperanto Sen Mitoj. Dua Prilaborita Eldono. Flandra Esperanto-Ligo, 2003. 367 paĝoj inkluzive de bibliografio, indekso ktp. Broŝurita. Ĉe ELNA: Kodo ESP016, prezo \$45.60.

Kaj en la kulturo de Esperantujo kaj en nia informado al la ĝenerala publiko pri Esperanto, estas multaj mitoj. Ofte temas pri falsiga simplismo, foje pri miskompreno, foje pri rekta mensogo. Ĉi tiajn diversajn falsajojn homoj aŭdas, kredas, kaj ripetas. En ĉi tiu libro Sikosek ekzamenas multajn el tiuj mitoj, kaj montras la originon de multaj el ili. Li celas senfalsigi nian informadon interne kaj ekstere, kaj tiel efikigi ĝin.

En informado, tamen, ne nur falsajoj malhelpas; li prave emfazas, ke misa argumenta taktiko ankaŭ ĝenas. Trudemo aŭ agresemo, mokante la lingvokonon de la informatoj, aŭ postulante ke ili tuj eklernu Esperanton, plej verŝajne forpuŝos homojn. Aliajn argumentajn trukojn li prave kritikis; ekzemple la falsan alternativon ("Learn all these languages... [longa listo] ... or this one").

Reklamo de Esperanto kiel "dua lingvo por ĉiuj" povas ankaŭ malhelpi; multaj homoj pretus aprobi la ideon de Esperanto, sed ili ne sentas emon mem lerni ĝin, kaj por defendi sian nelernemon, devos serĉi kialojn por kontraŭi Esperanton.

Pri la nombro de Esperantistoj, Sikosek listigas multajn taksojn de diversaj fontoj, kvankam ŝajnas iom strange ke li ne mencias la esploron de D-ro Sidney Culbert aŭ ties rezulton (1,6 milionoj de fluaj parolantoj). Tiu nombro (ofte truke netigita al "2 milionoj") ŝajnas al mi esti la plej ofte citita en usonaj

informiloj. Sikosek argumentas kontraŭ tiaj altaj taksoj per penseksperimento. Verŝajne estas pli multe da esperantistoj en Eŭropo ol en aliaj mondopartoj, kaj pli en urboj ol en la kamparo; do, supozo ke estas la sama propocio da esperantistoj en ekz. la universitata urbo Kolonjo kiel en la tuta mondo estus konservative. Sed, se estas unu miliono da esperantistoj el 5,5 miliardoj da homoj, devus esti 182 esperantistoj en Kolonjo. Sikosek trovas nur "maksimume tridek" kolonjanoj kiuj flue parolas Esperanton. Li daŭrigas la kontrolojn pri pluraj aliaj urboj kaj regionoj, montrante klare ke la asertoj pri miliono aŭ pli da fluaj Esperanto-parolantoj estas ege troigaj. Alivoje: UEA kaj la aliaj asocioj kune havas ĉ. 20 mil membrojn. Ne ĉiuj membroj de landaj asocioj flue parolas la lingvon, kaj ne ĉiuj fluaj parolantoj povas aŭ emas kotizi al asocio. Sed ĉu ni vere kredu, ke ekzistas pli ol 50-oble tiom da fluaj parolantoj de Esperanto, ol da movadanoj? Sikosek rekomendas, ke anstataŭ aserti ion pri la nombro de parolantoj, ni emfazu la disvastecon – ekzistas Esperanto-parolantoj en tiom da landoj, en ĉiuj kontinentoj. Tiu argumento ŝajnas al mi valida; ni ĉesu aserti, ke estas 1,6 (aŭ eĉ "2") milionoj da esperantistoj.

Sikosek ankaŭ celas pensigi nin pri la supozoj kaj kredoj de la "Tradicia Esperanto-Ideologio". En aparte bona ĉapitro li komparas la diversajn dokumentojn, esprimintajn kaj kritikintajn tiun ideologion – la Deklaracio de Bulonjo, la Manifesto de Prago, ktp, unuflanke; kaj la Manifesto de Raŭmo, "Esperanto en la 80-aj Jaroj", ktp, aliflanke. Li pensige kritikis la tradiciajn ideojn pri la maniero enkonduki Esperanton en oficialan uzon, kaj pri la efikoj, kiujn havos tiu enkonduko. Aliflanke, li ankaŭ kritikis la enfermismen de aliaj, kiuj ne nur emfazas la valoron de esperanta kulturo, sed rezignas pri la ideo informadi pri Esperanto ekstere.

La aŭtoro majstre disŝiras la tro

oftajn mensogojn ke Esperanto estas "facila" lingvo, "havas nur 16 regulojn", aŭ estas tute regula kaj senescepta. Iom pli dubinda, eble, estas lia kritiko de la diro ke Esperanto havas "fonetikan" skrib-sistemon kun "po unu sono je ĉiu litero". Li prave diras, ke ekzistas alofoneco en Esperanto, kaj ke la aboco ne estas vere fonetika. Sed ĉu ni diru en informiloj anglalingvaj ke "Esperanto has a phonemic writing system, with a one-to-one correspondence between letters and phonemes"? Nur lingvistoj komprenus tion. La priskribo "phonetic alphabet" estas ja falsa, sed pli ĝusta priskribo apenaŭ eblas sen ioma instruo pri la distingo inter sono kaj fonemo, fonetiko kaj fonologio.

Pri Esperanto kiel aparte taŭga traduklingvo, Sikosek ankaŭ skeptikas. Liaj diroj pri la malfacilo esperantigi poemojn, kiuj dependas de multaj unusilabaj vortoj (en ekz. la nederlanda aŭ la angla), ŝajne validas; sed ĝenerale mi trovas la argumentojn de William Auld (en *La Fenomeno Esperanto*) pli konvinkaj, simple pro tio, ke Auld multe tradukis; do li rajtas diri ke estas *relative* facila tasko traduki poemojn en Esperanton.

Krom tiuj temoj, Sikosek ankaŭ pritraktas la historion de la movado; kelkajn aliajn planlingvojn; homojn kaj organizaĵojn, kiuj vere aŭ onidire subtenas Esperanton; kaj la vivon de Zamenhof. Ĉiu ĉapitro finiĝas per listo de libroj pri la ĉapitra temo, kaj superrigarda komparo de iliaj bonaĵoj kaj mankoj. Li estas foje tre severa pri klasikaĵoj (ekz. la Zamenhof-biografioj de Privat kaj Boulton), kaj direktas nian atenton al pluraj neglektataj verkoj. Mi ne povas juĝi pri liaj juĝoj, ĉar mi mem ankoraŭ legis preskaŭ neniujn el la libroj de li prikomentitaj.

Enestas kelkaj stilaj malglataĵoj – ĉefe ĝenis min la foje konfuza trouzo de "resp." (respektive) – sed ĝenerale la libro estis tre legebla. Kurioze estas, ke Sikosek literumas "esperanto" malmaj-

Daŭrigo MITOJ sur p. 11

NEW FROM THE BOOK SERVICE

To order books from ELNA: (1) Send order by regular mail, with check or credit-card number and expiration date, to: ELNA Book Service, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530; (2) Order on-line with credit card at <http://www.esperanto-usa.org/retbutiko.html>

Note: if you order with payment by credit card and the book you want is not in stock, we will back-order it for you and charge your card only when and if it comes back into stock. This service is not available for payments made by check. Prices given are basic, before discounts for ELNA members.

Aventuroj de Pinokjo, La. *Carlo Collodi (Carlo Lorenzini)*. Translated by Jozefo Horvath. The famous children's novel about the puppet who wanted to become a real boy. Illustrated by Enrico Marzanti. 2003. 157 p. 205x135. Paper. Belgium. ISBN 90 71205 91 6. NEW
AVE004 \$15.80

Celakantoj. *Jorge Camacho*. 62 poems that sketch the author's life as an Esperanto speaker and introduce us to various Esperantist friend. Includes a long discussion of the author's work by Mauro Nervi. 117 p. 200x140. Paper. Netherlands. NEW.
CEL001 \$13.40

En la paŝoj de Jesuo. The Gospel according to St. Mark, divided into 30 one-day readings. 2004. 43 p. 215x135. Paper. United States. NEW.
ENL003 \$2.50

Hotel Desperado. *Esperanto Desperado*. A second music CD (after *Brokantaĵoj*) from Esperanto Desperado (Amir Hadziahmatovic, Brian Laustsen, Helle Eble Cleary, Kim Henriksen, His Bramsen). Includes booklet with lyrics and photos. 2004.

CD: 54'56". France. NEW.
HOT001 \$25.80

Invito al Go-Ludo. *Emori Minosuke*. A basic but complete introduction to what is arguably the world's most popular board game. Illustrated. 2004 (2nd ed). 51p. 210x150. Paper. Japan. NEW.
INV001 \$7.50

Malpli da teksto kaj pli da sekso. *Arnau Torras I Tutusaus*. We won't guarantee the first part of the title, but the second part seems to be true. Large-format picture book in the "underground" mode, by the author of *Romantikulo en la XX-a jarcento* and *D-ro Senesperanto serĉas la bonan etoson*. Not for the faint of heart or the prudish. Illustrated. 2004. 56 p (not counting the four covers). 295x210. Paper. Catalonia. ISBN 84-609-0204-8. NEW.
MAL014 \$20.70

Mondmapo en plasto. Five-color map of the world, with names of countries in Esperanto, in plastic. Good for tables or coffee tables. 2004. 740x460. Canada. NEW.
MAP002 \$18.60

Plu Meven: Ondumoj tra la mond'. *Meven*. The Breton Esperanto Chorus Meven sings fifteen traditional sea- and river-based songs from around the world. Includes booklet with lyrics and drawings. 2004. CD: 41'25". France. NEW.
PLU009 \$27.50

Raportoj el Japanio 7. *Hori Jasuo*. Another set of 35 essays and informational articles from Japan, this time from the year 2003. Read about catfish and earthquakes, vanity postage stamps (which Esperantists may find useful for promoting the language), professional wrestlers, and Japanese participation in the occupation of Iraq, among other things. Illustrated. 2004. 155 p. 210x150. Paper. Japan. ISBN 4-

947728-27-2. NEW.
RAP009 \$20.00

Saturno. *Jorge Camacho*. A collection of poems written by the author since 1995 in both Esperanto and Spanish. Includes a critique (in both languages) by Gonçalo Neves. 138 p. 200x140. Paper. Netherlands. NEW.
SAT001 \$14.50

Vivo simplas, La. *Arnau Torras I Tutusaus*. If it does, this book doesn't prove it. Large-format picture book in the "underground" mode, by the author of *Malpli da teksto kaj pli da sekso*. A very graphic novel. Illustrated. 2004. 56 p (not counting the four covers). 295x210. Paper. Catalonia. ISBN 84-609-0203-X. NEW.
VIV017 \$23.00

Vivbruligita. *Suad*. Translated from French by Rémy Bouchet. A young woman, condemned to be burned alive by her brother for the vile crime of premarital sex, tells about her experience. 190 p. 200x145. Paper. France. ISBN 2-9502432-7-4. NEW.
VIVO18 \$26.70

Bonvolu ne forgesi, ke ni ankoraŭ (kaj ĝis la mezo de novembro) akceptos proponojn por la jarfina literatura suplemento de ELNA. Ni instigas al ĉiuj membroj, kiuj volas proponi mallongajn prozaĵojn aŭ poemojn, originalajn aŭ tradukajn, proponi ilin al ni ĉe:

Literatura Suplemento
ELNA
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530
<donh@donh.best.vwh.net>

Dufoje NASKinta

de Marlon Garren

Kiam mi unue iris al NASK en 2003, mi tute ne sciis kion mi spertos. Mi nur unufoje antaŭe spertis Esperantujon kiam mi iris al la ELNA Kongreso en Atlanto en 2000. Tiam mi apenaŭ kapablis paroli eĉ simplajn frazojn kaj ne vere sentis min kiel parton de komunumo. Do, mi sekve legadis kaj finfine, en 2003, decidis iri al NASK en Brattleboro, Vermonto (nordorienta Usono). Nu, mi planis la vojaĝon kaj lasis mian ĉarman katon ĉe miaj gepatroj en la montoj de Nord-Karolino.

Mi alvenis al la Alt-lernejo por Internacia Trejnado (School for International Training) en Brattleboro, Vermonto. Mi estis iom nervoza ĉar mi konis neniun. Mi iris al la Kafejo tie por renkonti kaj konatiĝi kun la aliaj NASKantoj. Mi unue konatiĝis kun la instruistoj kaj poste iris al mia ĉambro kaj elvalizigis miajn aferojn. Poste mi forte spiris, eliris la ĉambron kaj metis la piedon en Esperantujon.

Mi estis terure nervoza kaj apenaŭ povis konversacii. Iom post iom mi konatiĝis kun la homoj kaj eĉ komencis senti amikecon. Mi komencis malnervoziĝi kaj kuraĝis paroleti. Post tri amikecplenaj semajnoj kaj post sperti lingve, kulture kaj eĉ anime la etoson de Esperantujo, mi sentis min kiel veran parton de granda internacia komunumo de ne nur samideanoj sed ankaŭ de granda familio.

Jen miaj komentoj post NASK 2003:

Estis bonege povi pli-bonigi mian kapablon paroli Esperanton kaj samtempe amikiĝi kun homoj el la tuta mondo. Miaj spertoj ĉe NASK estis riĉaj en maniero kiu nenia alia lingvo-lernada medio

povus provizi.

Ĝi estis vera inter-kultura sperto, kaj ĉiuj estis tiom bonvenigaj kaj akceptemaj al ĉiuj aliaj. Mi sentis min kiel hejme. Fakte, tio impresis kvazaŭ granda familio. La sperto estis tiom riĉa kaj rekompensa, ke mi tenere rememoras ĝin. La homoj kun kiuj mi konatiĝis ĉe NASK kaj la ĝenerala etoso vere stimulis sencon de monda civito kaj kamaradeco.

Mi dirus, ke mia restado ĉe NASK estis unu el la momentoj difinantaj kaj konfirmantaj de mia vivo. Ne eblas foriri de NASK nesangita iamaniere. Minimume vi amikiĝos kun novaj amikoj, kiuj donos al vi tre bonajn kialojn vojaĝi tra la tuta mondo.

Nu, ĉi-jare, mi decidis iri al NASK duan fojon. Mi iris kun amiko el Brazilio kun kiu mi laboras. La diferenco je la decido iri NASKen ĉi-jare restis en la kialoj de la decido. Last-jare mi estis preskaŭ senespera pri pli bona morgaŭo por la mondo pro la tiamaj teruraj okazajoj. Post NASK 2003, mi sentis ke ankoraŭ eblos ŝanĝi la mondon unupersonope. Krom la bonaj amikoj, mi ankaŭ trovis min kaj la vojo kiun mi volas sekvi en la vivo.

Ĉi-jare, miaj kialoj reiri NASKen estis ke mi volas rekapti la esperon kaj senton kiujn la kunNASKintoj antaŭe naskis en mi, renkonti malnovajn amikojn, kaj konatiĝi kun novaj amikoj. Mi ĝoje realvenis al Brattleboro, brakumis la malnovajn amikojn kaj salutis la novajn. Mi eĉ havis amikojn ekster la kursaro, kiujn

mi ankaŭ sukcesis reviziti. Estis granda plezuro repartopreni internacian kaj interkulturan etoson kaj festi nian Esperantistecon kune. Se lastjare mi sentis grandan naskiĝintan esperon por la mondo kaj la estonteco, ĉijare ĝi eĉ pli fortiĝis. Krome mi sentis ke mi finfine hejmenvenis ĉe NASK.

Mi nepre devas ankaŭ menciigi ke ĉe la Altlernejo kie okazas NASK, eblas ankaŭ sperti la homojn, kiuj estas tie por partopreni diversajn programojn. Tio estas ege interesa ĉar oni povas paroli kun homoj de ege foraj landoj kaj babili kun ili en la manĝejo, en la biblioteko, aŭ en la komputilejo. Kaj krom tio estas la homoj kiuj estas studentoj ĉe SIT kaj siaj profesoroj kaj la aliaj kiuj laboras ĉe la altlernejo. Ili ĉiuj bonvenigis nin kaj ili almenaŭ estis informitaj pri nia movado kaj lingvo.

Do, mi tutkore rekomendas NASK al ĉiuj ĉie. Se vi pensas ke vi ne povas ĉar vi ne kapablas paroli Esperanton pro la manko de Esperanto-praktikado, permesu min diri ke mi ankoraŭ ne havas Esperanto-grupon ĉe Knoxville, Tenesio, kaj denove en la domo mi nur povas paroli Esperanton kun mia kato kaj kun la amiko kiu akompanis min al NASK. Tio tute ne gravas, ĉar mi scias ke mi denove trovos Esperantujon ie en la mondo, kaj mi ja scias ke mi reiris al NASK kiam eble plej ofte. Ĉe NASK vi sendube komencus elseliĝi kaj amikiĝi kun diversaj homoj kun diversaj pensoj kaj interesoj. Ĉe NASK vi nepre plibonigus vian Esperanton. Tamen, la plej grava afero por mi estas ke ĉe NASK vi trovos veran komunumon, amikecon, kaj fratecon.

Sufero de Udegeo

● **El la artikolo “La ainaj parencoj vivantaj en la For-Orienta Rusio” de Oripak Esaman kaj MIYAZAWA Naoto, tradukis KABAYAMA Yūsuke. Aperis en *Heroldo de HEL*, Informilo de Hokkajda Esperanto-Ligo, n-ro 99**

Ni, ses anoj de la karavano al la for-Orienta Rusio, veturis per aŭtobuso dek du horojn, la lasta vojo kun marĉoj kaj truoj timigetis nin, al Krasnuj-Jar, la vilaĝo de la indiĝeno Udegeo en la plej nordo de la Apudmara Regiono. Ni sukcesis gajni afablon de danca grupo kuniri, kiu partoprenos en la festo de la vilaĝo. Tri el ni planis fari raportan trupon pri indeĝenoj kaj ade serĉi homon intervjueblan.

En la festo al ni salutis KANCHUGA Jakob (57jara udegeo), kaj vespere ni vizitis lian hejmon. Antaŭ la pordo de la domo kuŝis unuligna boato por ĉaso kaj fiŝado. La lumo de la interna elektra lampo palpebrumis eble pro la malforteco de elektro. Dum malfrua nokto ĉesas funkcii la elektrejo.

“<Bongusta> estas <fimi>. <Kato> estas <kujke>. Apro? ... Hm kiel nomiĝis?” Jakob instruis rememorante la udegean lingvon, kiun li parolis kun sia avino. Esaman el la raporta trupo respondis respektive samsignifan ainan vorton. “Aŭtuno de la rivero Bikin estas bela.” La udegea sonis al ni kvazaŭ la aina. La avo de lia patro estis aino laŭ lia diro. Lia estimata avo Nadiga, kies signifo estas <la lasta filo> en la udegea, estis sportisto de luktado kaj eĉ iris al Japanio por matĉo en la cara periodo. Li sentus nin japanojn kaj ainon kiel fratojn. Lia edzino regalis nin per teo kaj multe da kukoj. Liaj dekelk-jaraj filo kaj filino salutis kun hontemeto. Jakob alportis cervajon sekigitan kaj disigis ĝin en pecetojn.

“La udegea certe ne estas malaperinta lingvo. En la elementa lernejo oni instruis la udegean antaŭ tri jaroj, kaj en la lasta jaro venis korea Ne-Registara Organizo kaj promesis monhelpon por udegea vortaro. Se kvindeko da vortaroj

estus, la kondiĉoj ŝanĝiĝus,” diris Jakob. Ankaŭ Ljuba (19jara udegeino), kun kiu ni amikiĝis en la aŭtobuso, diris: “Kvankam mi ne povas lerte paroli en la udegea, tamen mi forgesas ne ĉion. Se povos, mi deziras lerni plu.”

Tamen sur tiu vilaĝo adis granda problemo rilata al la bazo de daŭrigo de la lingvo kaj de la kulturo. Severa detruo de arbaro okazas tra la vivteritorio de udegeoj. La rapidaj kapitalismigo kaj invado de fremdaj kapitaloj furiozas kiel uragano en tiu regiono kiel en la tuta Rusio. La ligna ekspluatado estas traktata kiel grava baza produktado de Apudmara Regiono pro ties imposto kaj multigo de dungoj. Tiel multe oni hakadas la arbojn, ke oni antaŭvidas, ke elcerpiĝos ligna materialo post kelke da jaroj, se daŭros tia hakado. La plimulto el la hakado estas farata de rusoj, eĉ malleĝa hakado ofte okazas. Multe el la ligno estas eksportataj al Japanio, Ĉinio, la Suda Koreio ktp. La Norda Koreio metas laborkampadojn en la Regionon, kio naskas karan akiron de fremda mono. En 1992 korea kompanio fondis sian bazon en la ĉemara vilaĝo Svetlaja en la nordo de la Apudmara Regiono, kaj komencis vastan hakadon de tajgo.

“Tiu hakota tereno estis certe laste restanta granda arbaro por udegeoj vivtenantaj per ĉasado. Kiom ajn ni petadis al la korea kompanio, ĝi malakceptis nin pro ĝia gajnita permeso de la regiona registaro. Pro tio ni decidis bari la portan vojon kaj ĉesigi la portadon de ligno.” Jakob ektnienis serioza. “La udegeaj ĉasistoj de ĉirkaŭaj vilaĝoj alterne deĵoris ĉe la du barejoj. Kvinope ni gardis kun pafilo mane: Tiam venis kozakaj soldatoj de landlimo per helikoptero por helpi nin. Estis tiel kortuŝite

apenaŭ ke mi larmis.” Nekredeblaj en la komenco por ni. “Ni obstinis en la someroj en 1992 kaj 1993. Uloj de la kompanio ne povas porti lignon dum tiuj jaroj. En udegeaj vilaĝoj ni kolektis subskribojn de ĉiuj kaj postulis ĉesigon de la hakado al la registara regiono.”

Rezulte la regiona registaro estis devigita ĉesigi la hakadon. La sekretariestro de la Primorja Indiĝena Asocio SELJUK Nadjezida rakontis pri tio. “Ne finiĝis la problemo tiam. Denove ĉi-jare aperis hakada plano. Ni denove kolektis subskribojn kaj vokis eĉ eksterlanden per interreto; kaj ni ĉesigis la planon. Malgraŭ ke tiu arbaro povas resti, fakte netuŝitaj arbaroj ĉirkaŭ la udegeaj vilaĝoj jam ne restas. Verdire inter udegeoj jam nun ne tre multaj estas tiuj, kiuj vivtenas per ĉasado. Pli multaj apogas sin al arbara hakado iamaniere; ekzemple, arbara gardisto. Mi povas diri, se daŭros nuna malorda hakado de duone laŭleĝeca kaj duone malleĝeca, baldaŭ la udegeaj vilaĝoj malvigliĝos kaj kadukiĝos.” Ni demandis kion ŝi faros. “Mi volas en tiu loko okazigi simpozion pri la graveco de tajgo kaj garda metodo por ĝi. Unue la vilaĝanoj devas mem pripensi. Kompreneble necesas helpoj de alilandaj Ne-Registaraj Organizo. Sed en Krasnuj-Jar la konstruo de domoj por ekologia turismo, kion rekomendis japana Ne-Registara Organizo, stagnas pro manko de financo. Mi opinias, ke ni ne devas fidi tutan diron de venanto el ekstero. Fakte kiun ajn ni elektus el ĉasado, fiŝado, lignohakado, turismo, tio ne eblus facile konduki al sukceso. Kiun ajn unuon aŭ kiujn ajn plurajn kombine ni elektos, almenaŭ ni devas reobservi

Daŭrigo UDIGEO al p. 11

Deziras Korespondi

BRITIO

*34-jara viro, patro, interesas filmoj, libroj, animoj, naturo kaj muziko, ludas futbalon kaj grimpas sur rokoj. Rob UTLEY, 27 Sycamore Ave., LEEDS LS8 4DZ, <rob_utley25@hotmail.com>.

*50-jara edzo, komencanto, grafikdesegnisto, interesas ludi pianon, gitaron kaj tamburojn, ŝatas librojn de Richard Friedman, pokeron kaj filmojn, retpoŝte. Paul YOUNG, LONDON, <paulyoung@blueyonder.co.uk>.

FRANCIO

*15-jara komencanto, interesas matematiko, muziko, historio, humuro. BERGONSO Maxime, 597 Avenue de Trevoux, 01000 SAINT DENIS LES BOURG, <bergonsom@yahoo.fr>.

GERMANIO

*41-jara viro, meznivela en Esperanto, interesas muziko, historio, literaturo, lingvoj, filozofio, serĉas korespondantojn kiuj volas lerni la germanan per Esperanto. Klaus MOHRHOFF, MINDEN, <klmohrhoff@aol.com>.

HUNGARIO

*45-jara tajpistino, sola virino, komencanto, interesas libroj, muziko, belarto, vivmanieroj en aliaj landoj, paperpoŝte. Judith KOVACS, Krisztina ter 6. 3/10, 7632 PECS.

*58-jara patrino, serĉas tre seriozajn geesperantistojn, kiuj havas gravajn direndaĵojn, samtempe ili estu bonhumoremaj, muzikemaj, jarage similaj al mi aŭ iomete pli aĝaj. GALLAI ZOLTÁNNÉ Éva, Szondi u. 8. I/5., H-7400 KAPOSVÁR, <gallai@netelek.hu>.

ITALIO

*57-jara komencanto, interesas kuirado, muziko, libroj, kolektas poŝtmarkojn (precipe el Francio kaj Svisio). Ugo PATTI, via Colombo 156,

94019 VALGUARNERA (Enna), <satumare@tiscali.it>.

KANADO

*17-jara komencanto, bona parolanto, interesas muziko, libroj, poezio, la vivo, politiko, lingvoj, biciklado. Vincent RIENDEAU, MONTRÉAL, Québec, <Vincent_riendeau@hotmail.com>.

KOREIO

*Universitataj studentoj. Via korespondado donos motivon kaj kuraĝon al ĵusbakitaj koreaj gejunuloj. LEE Jung-kee, <esperant@unitel.co.kr>. Por korespondi, vizitu <http://www.Esperanto.co.kr/> kaj elektu "Libera skribo".

MAROKO

*24-jara viro, mezkapabla esperantano, agnostikulo, interesas filozofio, scienco, literaturo, lingvoj, muziko. Mohamed GHARBI, Hasnouna N-ro 6, TANGER, <bagayogoo@yahoo.fr>.

NEDERLANDO

*20-jara virino, studento pri administrado kaj organizado, interesas kulturoj, lerni, amikeco, kun gesamaĝuloj. Priscilla van BLIJSWIJK, van Bijnkershoecklaan 175, 3527 XE UTREICHT, <P.N.vanblijswijk@students.usg.uu.nl>.

RUSIO

*9-jara knabino, ludas pianon kaj tablo-tenison, ŝatas naĝi en baseno kaj desegni, atendas leterojn de samaĝaj knabinoj. Nastja, MOSKVO, <murzilka@ok.ru>.

*11-jara knabino, interesas sportaj ludoj, legado, muziko, kolekti bildkartojn, kalendarojn, monerojn, sonkasedojn. Katja VASILENKO, str. Mojhajskogo 17-17, KRASNOJARSK 660041, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*12-jara knabino, interesas bestoj, muziko, legado, enigmoj, kolekti poŝtkartojn, monerojn, kalendar-etojn, ĉokoladojn. Anastasia TARLJUK, ul. Belinskogo 1-111, KRASNOJARSK 660020, <simoron@

scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*12-jara knabino, interesas moderna muziko, kantado, bestoj, legado, kolekti bildkartojn, fotojn pri bestoj, kalendarojn, afiŝojn. Lija BILINA, pr. Mira 12-21, KRASNOJARSK 660049, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*12-jara knabino, interesas moderna muziko, vojaĝoj, modo, kolekti afiŝojn de kantistoj, bildkartojn, kalendarojn, monbiletojn. Dobromira NEPOMN-JASHAJA, str. Parkova 11-4, KRASNOJARSK 660014, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*13-jara knabino, interesas vojaĝi, modo, legado, muziko, kolekti bildkartojn, modajn magazinojn, fotojn de filmaktoroj. Viktoria DERBAN, ul. 52 Kvartal 12-24, KRASNOJARSK 660037, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*13-jaraj ĝemelinoj, interesas muziko, artoj, filmoj, teatro, bestoj, naturo, kolekti bildkartojn, telefonkartojn, monerojn, fotojn de geamikoj. Ljudmila MITRJAIEVA & Julia MITRJAIEVA, ul. Shahtjorov 2 B 6-3, KRASNOJARSK 660020, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*14-jara knabino, interesas moderna muziko, naturo, vojaĝoj, modo, kolekti kalendarojn, bildkartojn, telefonkartojn, memoraĵojn. Vasilina MARJASOVA, ul. Zagorodnaja 35-5, KRASNOJARSK 660020, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*14-jaraj ĝemelinoj, interesas muziko, legado, bestoj, ludiloj, vojaĝoj, kolekti bildkartojn, maĉgumetojn, kalendarojn, monerojn, bankbiletojn. Seva MAMEDOVA & Elnura MAMEDOVA, ul. Perensona 38-49, KRASNOJARSK 660049, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*14-jara knabo, interesas komputiloj, vojaĝoj, moderna muziko, tekniko, kolekti bildkartojn, kalendarojn, telefonkartojn, monerojn, komputilajn

partojn. Mihail MALIHIN, PK 24847, KRASNOJARSK 660133, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*16-jara knabino, interesas floroj, palmoj, kaktaj, fiŝetoj, kolekti amuzajn bildkartojn, kalendarojn, kandelinojn, skribilojn. Natalia BELJAEVA, str. Parashutnaja 19-78, KRASNOJARSK 660079, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto Valerij MALIHIN).

*16-jara knabino, interesas vojaĝi, geografio, tradicioj, muziko, televido, sporto, kolekti sportajn magazinojn, memoraĵojn, bildkartojn, kalendarojn pri bestoj. Jevgenija SHATROVA, ul. Uritskogo 125-176, KRASNOJARSK 660017, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*17-jara knabino, interesas sporto, filmoj, floroj, kolekti monbiletojn, monerojn, bildkartojn, kalendarojn. Tatjana SEVOSTJANOVA, str. Shorsa 29-114, KRASNOJARSK 660050, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto Valerij MALIHIN).

*18-jara knabino, interesas sporto, modernaj dancoj, muziko, naturo, floroj, bestoj, literaturo, kolekti bildkartojn, kalendarojn, telefonkartojn. Tanja SHIPICINA, str. Sudostroitel'naja 113-209, KRASNOJARSK 660012, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto Valerij MALIHIN).

*18-jara studentino pri turismo, interesas vojaĝi, legi, muziko, kolekti bildkartojn, kalendarojn, fotojn de geamikoj. Nadja MELK, str. Shevchenko 34-26, KRASNOJARSK 660092, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*18-jara sperta esperantistino, interesas moderna muziko, geografio, legado, vojaĝoj, lingvoj, kolekti memoraĵojn pri diversaj landoj. Anastasia PRAVKINA, ul. Dubrovinskogo 106-136, KRASNOJARSK 660017, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*19-jara studentino, interesas dancoj, muziko, kuirado, vojaĝado, sportoj, teotrinkado, legado, kolekti fotojn de geamikoj, bildkartojn. Natalia KAZANCEVA, str. Perensona

5 "A"-154, KRASNOJARSK 660049, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto).

*20-jara knabino, interesas muziko, desegnado, sporto, saŭno, vojaĝoj, fotado, kolekti fotojn de geamikoj, kalendarojn, magazinojn, monerojn. Irina VOLOBUEVA, str. Slavi 13-99, KRASNOJARSK 660119, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto Valerij MALIHIN).

*20-jara knabino, interesas naturo, floroj, fotado, bestoj, filmoj, muziko, kolekti fotojn de junuloj kaj viroj. Maria JUDINA, str. Menjinskogo 12 "B"-212, KRASNOJARSK 660028, <simoron@scn.ru> (kontaktadreso de instruisto Valerij MALIHIN).

TOGO

*26-jara studento pri juro, interesas kulturaj intersanĝoj, muziko kaj sporto, serĉas korespondantojn en Germanio, Svisio, Francio, Britio, Belgio, Usono aŭ Afriko. AFANGBEDJI Marcel, B.P. 6287, LOMÉ, <maafang@yahoo.fr>.

*26-jara studento pri librotenado, kantisto kaj pianisto, interesas muziko, pianludado, Esperanta literaturo, historio. AVOSSEY Thomas, B. P. 13169, LOMÉ, <thomas_avoss@yahoo.fr>.

Koresponda Servo de Edukado.net
ĉe <<http://www.edukado.net/korespondado.jsp>>

Daŭrigo MITOJ de p. 6

uskle. En la la indekso mankas kelkaj indikoj pri preparolataj homoj (ekz. Claude Piron aperas en la bibliografio kaj plurfoje en piednotoj, sed tute ne en la indekso), sed ĝi plejparte estas bona. La detala enhavtabelo estas aparte bona.

Sume, mi taksas ĉi tiun libron aparte grava kaj leginda. Ĉiu, kiu laboras pri informado, legu ĝin zorge kaj pripensu la enhavon. Aparte grava estas, ke ni plibonigu (aŭ tute reverku) niajn informilojn, elsarkante la falsajojn kaj misajojn, kiujn malkovris Sikosek.

Jim Henry

Daŭrigo UDIGEO de p. 9

nian identecon kaj kulturon respekti riĉon de naturo t.n. tajgo."

Ni revenu al la rakonto de Jakob. "Ni udegeoj estas idoj de la ĉi tiea neobeanta reĝlando Bohai. Poste Ĝingis-Ĥano atakis, kaj nia etno fariĝis malgranda." Ili tion kredas. "Post la rusia revolucio, ni, kiuj vivis nomade, estis kolektita en vilaĝojn kulturaj. Oni faris asimiligan politikon en ruson. En periodo de Stalino kunvivintaj ĉinoj eliris pro trudita transloĝado, kontraste rusoj envenis. Krome estis tia ĉino, kiu restis ĉi tie ŝanĝinte sian nomon en la udegean. En soveta periodo oni senpage provizis nin per pafiloj, kugloj necesaj por ĉasado, benzino ktp. Post la disrompo de la Soveta Unio ni estis devigitaj aĉeti necesajn aĵojn. Vivo de multaj sen mono malfaciliĝis." Kiel ili vivtenas nun? "Antaŭe tigra felo kaj cerva korno estis kare venditaj al Ĉinio kaj Japanio, sed nun ni vendas felojn de zibelo kaj de cervo al rusoj. Pro la hakado malmultiĝis aproj manĝantaj fruktojn de arbo kaj malmultiĝis tigroj manĝantaj apron, kontraste ofte aperis cervoj manĝantaj plantojn sur la resto de la hakado." Li uzas kaptilon por ne difekti la felon.

Jam apenaŭ meznoktigis, kaj ni devis reiri nian gastan hejmon antaŭ la ĉeso de la Elektra funkciado. "Vi fratoj el malproksima lando, bonvolu anonci al multaj personoj, ke ni tie ĉi vivas kaj batalas." Ĉe nia disiĝo Jakob ripetis serioze. "Tiu arbaro kun netuŝita tajgo ne nur estas nia vivo, sed ankaŭ estas la trezoro de la tuta logantaro en la Apudmara Regiono eĉ en la mondo. Mi esperas ke vi informu diversajn organojn kaj homojn. Se vi faros bone, ni povos gardi la arbaron. Nepre ankoraŭfoje vizatu tien ĉi kaj parolu en la aina, mi esperas." Li adiaŭis per la udegea dankvorto <Asasa, asasa>. Sur la ĉielo brilis plenaj steloj, kiujn certe rigardis liaj avino kaj praavino.

POST-UK EKSURSO AL KOLORPLENA, MULTKULTURA YUNNAN PROVINCO



PARTOPRENANTOJ:

Supra vico: Robert Burgess, Robert Swenson, Werner Moeller, Yosi Shemer, Steve Wagenseller. **Meza vico:** Edgar Müller, Frederike Fillmann, Lusi Harmon, Pierette Müller, Maya Kennedy, Amri Wandel. **Antaŭa vico:** Mathilda Landau, Rochelle Grossman, Hartmut Fillmann, Mary Napolitan, Rina (ĉiĉerono).

LASTATEMPE pli kaj pli da Esperantistoj uzas la eblecojn renkontiĝi, kunveni aŭ kongresi por ekzerci Esperanton kaj ĝui eblecon kunludi kaj kunlabori kun aliaj Esperantistoj. La interreto estas grandega sukceso, sed nenio plibonas ol vizaĝ-al-vizaĝa kontakto. La plej granda kaj impona estas la Universala Kongreso de Esperanto, ĉijare en Pekino. La 2031 partoprenantoj el 51 landoj surpriziĝis pri la grandegaj ŝanĝoj (plej parte bonaj) en Ĉinio. Amasoj da novaj Ĉinaj Esperantistoj avide serĉis alilandanojn por interparoli. (Dum la antaŭa UK en Pekino en 1986, plejparte nur altrangaj Ĉinoj povis partopreni.) Ni esperas, ke la novaj, entuziasmaj junuloj ĝuis la UK tiom kiom ni!

EN 2005 - 90a UK en Vilnius, Litovio 23-30 julio. Ĝi estos pli granda kaj eĉ pli impona ol la UK en Ĉinio. Vilnius situas en la mezo de Eŭropo, do multe pli da Esperantistoj povos facile partopreni. La malnova parto de la urbo estas monda heredaĵo de UNESCO. Ĝi estas ege bela, kun riĉa historio. Antaŭ kaj post la UK ni havos okazon koni la aliajn Baltajn landojn, kaj eble parton de Belaruso aŭ Pollando. Aliĝilon venos en la gazeto *Esperanto*. La kotizo plialtiĝos post la fino de 2004. Aliĝu frue!

Tut-Kalifornia Regiona Konferenco (TKEK)
Santa Barbara CA - 25-27 februaro 2005.

53a Jar-Kongreso de ELNA

Universitato Concordia, Austin TX 10-13 junio 2005.

Kaj kompreneble **NASK!** Tri-semajna kursaro por studi Esperanton, la plej bona en la mondo! Datoj estos anoncitaj baldaŭ.

OPPORTUNITIES TO VOLUNTEER

- Have you ever prepared a grant proposal?
- Can you devote some time to researching appropriate foundations?
- Are you personally aware of foundations that distribute grant money to worthy organizations?

WE CRAVE YOUR TALENT!

Anna Bennett - Volontula Komitatoestro
[208] 343-2466 - annambennett@yahoo.com

Esperanto Vojaĝ-Servo • 1824 Euclid Ave., Berkeley CA 94709 • [510] 843-2500 • lusiharmon@aol.com

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Leesburg FL
Permit # 1040